toj ĝis la I-a de Decembro. Kaj la asocio ne posedis la tutan sumon !

Ve ! La posedantino sciigis, ke ŝi deziras ricevi la sumon tuj. Ne eblis ! Sed Micard ne rezignis. Li trovis lignovendiston, kiu konsentis aĉeti la tutan bienon, kaj revendi parton al la asocio. La batalo pri la arboj atribuotaj al la arbovendisto aŭ al la Kulturdomo fariĝis ankoraŭ pli akra. Fine la du « batalantoj » akordiĝis : la arbovendisto vendis la konstruaĵojn kaj 8 hektarojn por 3.000.000 fk. Estis eble tuj pagi 2.000.000, pli malfacile pagi la ceteran milionon antaŭ la fino de decembro. Restis nebula la rimedo pagi la impoŝtojn kaj malkleran procentaĵon (750.000 fk) je la fino de Januaro ! Nova alvoko estis farita. Kaj dank'al « skrapado de la interno de la tirkestoj » la kastelo Grésillon fariĝis posedaĵo de la « Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj ».

Granda batalo estis gajnita de Micard. Li ĝojis pro tio, ke « de nun la esperantistaro havos sian domon ». Li multe klopodis por atingi tiun celon, sciante ke de tiam komenciĝis nova etapo, kiu estos fonto de novaj zorgoj. Dank'al li la asocio estis posedanto de belega konstruaĵo... tiel malplena kiel la kaso. Ĉar neniam troviĝis la 600 esperantistoj, kiuj per sia helpo povus ebligi la necesajn aranĝojn : instaladon de akvo kaj elektra kurento, aĉetadon de litoj, littukoj, kovriloj, tabloj, manĝilaro, kuirilaro, ktp...

Per instigo de Micard, kelkaj bonvolemuloj venigis la elektran kurenton en la ĉambrojn dum Pasko. Kelkajn semajnojn poste estis eble sammaniere venigi la akvon kaj fiksi la lavujojn.

Sed ĉu estos eble malfermi la kastelon dum la somero ? Tiun demandon multfoje faris al si Gesroj Micard. La alvokojn al financa helpo sekvis alvokoj al prunto de materialo. Kaj en Aŭgusto 1952, la unuaj vizitantoj alportis siajn littukojn, kuŝis en litoj pruntedonitaj de la direktoro de proksima lernejo, uzis la meblaron kaj manĝilaron de Gesroj Micard ! Cent kvindek personoj vizitis la kastelon, kaj Micard povis skribi : « Mi povas aserti nun, ke la funkciado konfirmis la plej optimismajn esperojn ; la enspezoj permesos pagi la ordinarajn elspezojn de la tuta jaro ». Li forgesis diri, ke tiun rezulton oni povis atingi ne nur per la ĉeesto de 150 gesamideanoj, sed ankaŭ dank'al lia granda sindonemo kaj la sindonemo de Sino Micard, akceptantino, kuiristino kaj servistino !

Dank'al loterio, la Kulturdomo povis aĉeti en 1953 sian propran meblaron. Sed mankis komforto kaj multaj personoj kiuj ne komprenis, kia grandiozaĵo jam estis la malkomforta kastelo, akre plendis... kaj neniam revenis.

La vivo de Gesroj Micard estis de tiu jaro 1952 grandparte dediĉita al la pluvivado, al la komfortigo de Grésillon. La laboro farota estis grandega. Ĝi bezonis ne nur sindediĉon sed ankaŭ entuziasmon ne difekteblan de la riproĉoj aŭ malhelpaĵoj, diplomatecon en la nemalhelpeblaj diskutoj, eĉ kvereloj. Estis necese ke la vojo sekvota estu klare difinita kaj senmanke irata. Estis necese malplezurigi tiujn, kiujn ne vidis la larĝan fosajon inter la farindaĵoj kaj la fareblaĵoj.

Nur entuziasma homo povis sin ĵeti en tia batalo, nur nemalkuraĝebla viro povis daŭre labori « kontraŭ ventoj kaj tajdoj » al la celita stelo. Nur diplomateca klarvida viro povis gvidi tian aferon ĝis pli kvietaj akvoj. Tia viro estis Micard kiu, plie, tiel bone konis la homojn, ke li neniam postulis de ili pli ol ili povis fari, sed eltiris el ili pli ol ili mem sin kredis kapablaj fari.

Ni esperu, ke ĉiuj esperantistoj konscias pri la granda paŝo farita de la Esperantista movado dank'al Henri Micard.